

ALIĜU al

INTERASOCIA RENKONTIĜO de ESPERANTO ĉe MEDITERANEO



SĜETE 22a ĝis 26a de aprilo 2011

« Le Lazaret » - La Corniche - 34200 SETE - FRANCIO

66-a KONGRESO de SAT-AMIKARO
NACIA INTERASOCIA KONGRESO de ESPERANTO-FRANCE
62-a KONGRESO de la FRANCAJ ESPERANTAJ FERVOJISTOJ



1. Tutlandaj aktivajoj

(1) KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj) (raportas Cyrille Hurstel, VP ER)

Januaro 2008 : opini-esploro ĝis fino de marto : La ĉefa rezulto estas ke duono de francoj jam aŭdis pri Esperanto, kaj tiuj forte subtenas la ideon ke « La eŭropa unio devus diskonigi Esperanton ».

Dum la kunveno de la komitato en januaro 2008, ni decidis pri strategio por eksteraj rilatoj jena : « ni montru Esperanton al amaskomunikiloj antaŭ ol la balotoj ». La celo estis aperigo de 2 komunikoj monate. Tiuj komunikoj celis ĵurnalistojn kiu aperas en la rubrikaj « Eŭropo, internaciaj aferoj, politiko ». Artikolo aŭ elsendo ne rekte sekvas niajn gazetarajn komunikojn, sed ili plutenas la ideon ke Esperanto vivas kaj estas moderna ideo.

Listo de komunikoj de la antaŭa jaro :

28an novembro 2008 : Komunikado okaze de la ceremonio por la 150a datreveno de Zamenhof ĉe Unesko la 15an de decembro 2008.

5an februaro 2009 : Komunikado pri la eŭropa parlamento okaze de la propono de Ljudmila Novak pri multlingveco.

20an februaro 2009 : Komunikado okaze de la internacia tago de la gepatra lingvo fare de Unesko.

6an marto 2009 : Kompreniĝi en Eŭropo : vera multlingveco aŭ nur-angla je ĉia kosto ? (Komunikado pri la dumferiaj staĝoj « Darcos » por malriĉaj infanoj).

30an marto 2009 : Pintkunveno de NATO : Kiel pripensi sendependa eŭropan defendarmeon ?

15an aprilo 2009 : Forta subteno de la francoj por uzado de Esperanto en la eŭropa konstruado.

26an aprilo 2009 : Lasta komunikado antaŭ la eŭropaj balotoj, pri la nacia kongreso okazonta en Troyes, 7-11 majo 2009. France 3 elsendis dum kelkaj minutoj.

Junio 2009 : Cyrille Hurstel instigis la prezidanton de UEA sendi leteron al la 4 landoj (Brazilo, Barato, Rusio kaj Ĉinio). Brazilo positive respondis. Gazetara komunikado de UEA antaŭ kaj dum la UK estis resendita de la agentejo France Presse en Pollando, kaj okazigis kelkajn artikolojn en la gazetoj en Francio.

26an de aŭgusto 2009 : Post respondo de Brazilo, tiu komunikado disvastigas la fakton ke « Brazilo subtenas Esperanton ».

Aliaj kontaktoj kaj agadoj :

Fine de aprilo : Cyrille Hurstel zorgis pri la filmopermeso en Strasburgo por Eŭropo-Demokratio-Esperanto Germanio.
Kontaktoj kun la Eŭropaj verduloj devis konduki al renkontiĝo kun la ĉefaj kandidatoj, sed tio fiaskis ne pro esperantistoj.

29an de aprilo 2009 : Kontakto kun sinjoro Jacques Attali okaze de artikolo lia pri la funkciado de la G20. Li respondis la 9an de majo 2009.

Junio 2009 : Renkontiĝo de Coorditrad, la tradukistoj de la asocio ATTAC en Freiburg (Germanio). Cyrille Hurstel prezentis Esperanton kaj instruis dum provleciono kun la helpo de Manfred Westermayer kaj Ursula Niesert el Germanio.

13an de Julio 2009 : Cyrille Hurstel liveris leteron kaj kelkaj ekzempleroj de « Le Monde de l'Espéranto » en ĉies leterkesto de la francaj ĵus elektitaj eŭropaj deputitoj por proponi renkontiĝon. Nur unu respondis ke li jam konas kaj ĵus inaŭguris zamenhofan trafikcirkolon !

Julio 2009 : Dum la UK, Cyrille Hurstel renkontis polajn kaj ĉinajn ĵurnalistojn dum la lasta gazetara konferenco.

26an de septembro 2009 Renkonto de sinjoro Marc Rousset, aŭtoro de la libro « Le nouvel axe Paris-Berlin-Moscou ». Decido pri kunlaboro por atingi « Esperanto ĉe la abituriento ».

(2) Informado

Dum la periodo de oktobro 2008 ĝis decembro 2009, informpaneloj estis menditaj de pluraj Eo-asocioj : Eo-Gironde, St-Dizier, Mulhouse, Eo-Info, Eo-Rennes, Eo-Rhône-Alpes kaj liveritaj al pluraj : Gironde, Mulhouse. La aliaj mendoj estis traktitaj malfrue pro malapero de la antaŭa provizanto.

Nova stoko de la faldfolio « Langue équitable » estis presita, je 50 000 ekzempleroj, pli favore.

Nova TTT-ejo de Espéranto France, kun kunlaborebla strukturo, estis inaŭgurita, dank'al laboro de nia TTT-estro Emmanuelle Richard.

Le Monde de l'Espéranto estis eksendita al pluraj bibliotekoj, per financa subteno de la konto Klubo 2000.

Ne multe progresis la projekto fari dosieron aŭ flugfolion por kolektado.

Farataj

Flago kun la nomo Esperanto
Glumarko: malmultekosta (eble kun slogano)
Pri-oficaj slipoj (priskribo de taskaro de estraranoj kaj komisiitoj)
Elpensadoj pri nova lernolibro
Pripensata : starigo de Reta libroservo

Faritaĵoj

Daŭropova evoluigo, "Agenda 21" : subvencio ricevita, pluraj konkretaj rezultoj.
DVD "Esperanto estas" (filmetoj): 150 ekzempleroj aĉetitaj por ĉiuj kluboj. Efektive disponigitaj al kluboj de kelkaj Federacioj.
Decido ne plu partopreni al lingvofoiro Expolangues per budo.
Apero de lernolibro Assimil «Espéranto de poche», gratulon al R. Triolle kaj JL Texier.
Aperigo de pluraj Gazetaraj Komunikoj, gratulon al Cyrille Hurstel, VP pri ER.
Inaŭguro de nova TTT-ejo (novembro 2009)
Organizado de omaĝo al Zamenhof ĉe Unesko (15/12/2008), gratulon al C. Nourmont
Duaŝtupa opinienketa kampanjo
Libroamaso heredigita Yvette Vierende al UFE, dankon al JF Passarella kiu sendis liston de libroj al ĉiuj Federacioj.
Sukcesa budo de UFE dum movada foiro de la UK 2009 en Bjalistoko.
Fringoj 2009 (Internacia renkontiĝo de infanoj) iĝis MIREGE. Okazis dank'al subvencio ricevita de Eŭropa Unio (23 000 €) kaj patronado far UFE..
Prelegvojaĝoj Kostik Demjanenko (Ukrainio), Ĉino en junio, Japano revenos, gratulon al kunordiganto Yves Nicolas.
Kreiĝis nova asocio "entreprise espéranto". Gratulon al Philippe Bérizzi.
Malfermo de nova konto en alia banko, pli etika
Modifoj de la Interna Regularo, por adaptigi kelkajn regulojn al la realo
Represo de la metodo 11 : 500 ekzempleroj represiĝis sensanĝe.
Afrika solidareco : sendado de libroj kaj materialo (per specifa konto) al 6 kluboj en Benino, Ebura Bordo, Togolando.
Por helpi al rekonstruo de retejo kaj servila translokigo de edukado.net : ni kolektis 3705 € el deko da homoj kaj asocioj. Krome, nia asocio donacis 500€.
Decido fari Retan informleteron kunfondantan Okazas kaj Verda Krabo.

Kompilis la ĉi-jaran Jaran Raporton AK, helpis VB,
kontribuis CH, AJ, CNM, la kontraktintaj Federacioj, Asocioj.

- Vic-Prezidanto pri Eksteraj Rilatoj kaj Komunikado: C. Hurstel
- Vic-Prezidanto pri Kulturo kaj Kongresoj: A. Rousseau
- Estrarano pri regionaj Federacioj kaj interesocia kunlaboro : X.Dewidehem (ekde sept. 2009)
- Estrarano: A. Piolat

Komisiito pri Kongresoj kaj Revuoj : C. Nourmont
 Komisiito pri Informiloj kaj enpaŝigado : B. Flochon

2. Federacioj kaj Asocioj

Vidu la aneksitan duflankan resuman superrigardon. Kompleta versio havebla laŭ peto al la estraro aŭ legebla rete ĉe <http://esperanto-france.org>

3. Financoj

Vidu la spezkonton kaj bilancon 2008-2009 anekse.

Kial tiom granda malprofito ĉi-jare, post profito pasintjare ? Inter alie ĉar :

- Ni havas altegajn ŝuldojn al internaj partneroj (JEFO, membroj, ...)
- eksterlandajn abonojn ni pagis, inkluzive la pasintjarajn.
- 4443 € estis erare registritaj pasintjare, la korekto estas spezo.

Apartan dankon al Gisela Passarella, Jean Delhomme pro la librotena apogo kaj al Seb Montagne pro la informadika helpo.

La kontoj estos detale prezentitaj dum la Ĝenerala Asembleo en Kaiserslautern. Se vi havas demandojn, sed ne ĉeestos, ne hezitu kontakti rekte la tiaman Kasiston.

4. Resuma bilanco de kromaj faritaj kaj ne faritaj agadoj (ne kompleta)

Nefaritaj / Decidoj aŭ ideoj ne efektivigitaj

Solvado de nia libroteneda problemo, dungo de librotenisto.
 Organizi seminarion pri Publikaj Rilatoj
 Trovi novajn redaktorojn kaj enpaŝiganton por *Le Monde de l'Espéranto*
 Fari reklamkampanjon pri apero de poŝa Assimil
 Trovi novan gazetaran ataŝeon (studanto)
 Organizi regionajn staĝojn pri instruado
 Senpezigi tagordon de Komitatkunsidoj
 Starigo de fondaĵo ricevonta heredaĵojn : tro malfacile farebla
 Aldoni formularon por agademuloj en la retejon; kaj retpaŝon por listigi eblajn agojn

(3) Komisiono pri eldonado

Estis elektita komisiono pri eldonado, kiu ricevis plurajn proponojn (jam tradukitaj aŭ tradukotaj verkoj), sed nenio povis ĝis nun efektiviĝi. Fine eldoniĝis dank'al la streboj de Ginette Martin, la franca versio de 'La Strato Zamenhof' 'La Rue Zamenhof', ĉe eldonejo L'Harmattan. Pliaj projektoj ne realiĝis : Bruna Urseto, esperantigo de la gvidlibro « Voyager presque gratuit ».

(4) Rebatado (raportas Aleks Kadar)

Plu funkcias la retlisto reago-fr, kiu kunigas membrojn de UFE kaj ne-membrojn, cele prepari kaj instigi la rebatojn al mencioj de Esperanto kaj pri lingvo-politiko en la amaskomunikiloj : radio, televido, gazetoj, interreto. Pliaj rebatemuloj bonvenas. <http://groups.google.com/group/reago-fr?hl=eo>

(5) La kongreso (raportas Claude Nourmont)

Ĝi okazis en Troyes, bone organizita de la loka grupo. Raportado pri ĝi aperis en LME. Estis densa programo de laborkunsidoj kaj prelegoj, movada foiro kaj altnivelaj kulturaj vesperoj. Pluraj artikoloj kaj televid-raportoj. Gratulon al organizinta asocio Esperanto 10 ! Estis decidite organizi komunan germanan-francan kongreson en Kaiserslautern en 2010 (21-24an de majo) kaj interesocian renkontiĝon en Sète (Langvedoko-Rusiljono) en 2011.

(6) Rilatoj kun UEA (raportas Claude Nourmont)

Reprezentas UFE ĉe la komitato de UEA François Bartsch kaj Claude Nourmont, kaj ambaŭ partoprenis ties kunsidojn dum la UK en Bjalistoko. Francoj estis la plej granda grupo en la UK post la pola. Ĉefdelegito de UEA por Francio pluestas Renée Triolle.

(7) Revuoj (raportas Claude Nourmont)

Le Monde de l'Espéranto (LME)

Aperis unu simpla (567) kaj unu duobla (568-69) numero dum la koncerna periodo. Prepariĝis alia duobla (570-71), kiu aperis oktobre 2009. Redaktita de C. Nourmont, la grafikan laboron prizorgas B. Flochon; relegas F. Bartsch. En ĉiu numero aperas speciala dosiero foje en la franca pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, junulara paĝo, kulturaj paĝoj, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj.

Okazas

"Okazas" aperas ene de LME kaj redaktas ĝin Claude Nourmont kaj Bruno Flochon, kun rubriko "kiel fari?", kalendaro (F. Bartsch), ĉefaj sukcesoj de la grupoj *Toutes les occasions sont bonnes* (redaktas Jeanne-Marie Cash), listigo de ĉefaj mencioj pri Esperanto en la gazetaro kaj kontaktadreso (B. Flochon).

(8) Prelegvojaĝoj (raportas Claude Nourmont)

Daŭre kunordigas la prelegvojaĝojn Yves Nicolas. En 2008-09 okazis prelegvojaĝo de Kostiantyn Demianenko, fakulo pri Azova maro, el Ukrainio, prelegvojaĝo de estrarano de UEA HORI Jasuo el Japanio, (kiu denove prelegos en 2009). Ankaŭ turneis Alejandro Cossavella el Argentino en muzika turneo organizita de Eurokka. Ĉiuj tiuj vojaĝoj estis bona okazo por vigligi la lokan vivon kaj vekti la atenton de ĵurnalistoj kaj eksteruloj.

(9) FEI kaj ekzamenoj (raportas Anne Jausions)

Niaj 7 reprezentantoj en FEI (Franca Esperanto Instituto) ekde 2007 ĝis 2010 estas : B. Allée, X. Dewidehem, H. Gonin, C. Hurstel, A. Jausions, G. Riste, R. Triolle.

Ĉi-jare (novembro 2008 - decembro 2009) okazis 20 sesioj. Rezultoj :
72 kandidatoj por la 1a grado (sukcesis 65)
20 kandidatoj por la 2a grado (sukcesis ĉiuj)
1 kandidato por la 3a grado - komuna parto (sukcesis). Ne sufiĉe.
4 kandidatoj por la 3a grado - pedagogia parto (sukcesis 3)

(10) Sidejo (raportas Susanna Beglaryan)

Entute ni traktis 837 mendojn kaj nenombreblajn telefon Alvokojn kaj retmesaĝojn. La sideja skipo konsistas el pluraj helpantoj : Jean-Louis Poullet, Jean-Francois Mestelan, Liliane Bon, Hélène Le Bihan, Anne-Marie Chaney. Vizitas la sidejon multaj homoj : eksterlandaj ĉirkaŭ dekkvin : Brazilio, Japanio, Australio, Nov-Zelando, Kanado, Svislando, Rusio ... Ni havas vizitojn preskaŭ ĉiu tage, provencaoj, lokaj esperantistoj, kelkfoje neesperantistoj, kiuj ĉenerale volas aĉeti librojn, havi pli da informon aŭ simple viziti la sidejon. La sidejo estas malfermita lunde, marde, merkrede je la 9a ĝis la 18a horo. Ĵaŭdo estas rezervita por dosieroj traktendaj, sed ni ricevas liveradojn ankaŭ antaŭviditajn au pasantajn vizitantojn. Nia ĝenerala sento pri la sidejo kaj la sideja laboro : ni faras pli multe ol ni komunikas. Specifajn agadojn prizorgis ankaŭ la sideja skipo :
- Organizado de grupvojaĝo al Kubo (UK 2010).
- Registrado de aliĝiloj kaj mendoj por Kaiserslautern (informrespondoj rete, letere, telefone)
- Dosiero de subvencipeto A-21
- Projekto de Arkivo (Reordigo de la biblioteko kaj arkivoj en la kelo. Organizantoj : Régis Fournier kaj Jean Lazert helpitaj de la konsiloj kaj de la antaŭa laboro de Pierre Royer

- Babilrondo kaj konversacia rondo. Organizantoj : Sonia Amariglio, Yvette Chatenet kaj Jean Delhomme.

Nia ĉiutaga vivo inkluzivas ankaŭ : mastrumadi la lokon, fronti diversajn problemojn, interalie akvodomaĝoj dum kristnasko : akvoŝovelado de la sidejo, savi librojn kaj dokumentojn, pretigi dosierojn por asekuro...

3. Komitato

Elektita antaŭ Troyes (majo 2009), kunvenis 4foje : maje, sept. 09, jan, maje 2010

Reprezentas membrojn (elekto-jaro) :

- . Michèle Abada-Simon
- . Karine Bérizzi
- . Guy Camy
- . Jeanne-Marie Cash (2009)
- . Philippe Chavignon (2009)
- . Emmanuel Debanne
- . Bruno Flochon (2009)
- . Guillaume Harmide
- . Anne Jausions
- . Aleks Kadar (2009)
- . Christian Lavarenne
- . Jean Lazert
- . Claude Longue-Epee
- . Sébastien Montagne (2009)
- . Armelle Piolat
- . Axel Rousseau (2009)

Reprezentantoj de la asocioj (kontraktintaj) :

- Auvergne Eugène PAPCIAK
- Bretagne Xavier GODIVIER
- Centre-Ouest /
- France-Est Cyrille HURSTEL
- Ile-de-France Madeleine CREPATTE
- Languedoc-Roussillon Véronique BICHON
- Midi-Pyrénées Marion QUENUT
- Nord Xavier DEWIDHEM
- Poitou-Charentes Marie-France CONDE-REY
- Provence Gilles WALLEZ
- Rhône-Alpes Mireille BESSET

- Espéranto Jeunes (JEFO) Julia HEDOUX
- FET Frédéric SCIBOR
- FKEA Marie-Thérèse MARIN
- GEE Michel DECHY

Estraro (elektita en Troyes 10anmaje 2009)

- Prezidanto: X.Dewidehem (ĝis septembro), poste : A. Kadar
- Kasisto: A.Kadar
- Ĝenerala Sekretario : V. Bichon (ekde sept. 2009)

